

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

PREPARU VIN PARTOPRENI  
LA 24-AN  
KONGRESON EN PARIZO!

MARTO-APRILLO 1932

N-ROJ 180-181



Hi ha una manera indirecta de protegir a la  
**Federació Esperantista Catalana:**

Comprar les coses que ella patrocina.

## **Kataluna Antologio**

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

## **Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto**

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

## **Zamenhof-disko**

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.º Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a \_\_\_\_\_

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA





# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

CARRER DEL DR. ZAMENHOF

Inauguració: 14 d'abril

Decididament la inauguració oficial del carrer que porta el nom del mestre tindrà lloc el 14 d'abril, a dos quarts de dotze del matí. Aquesta data correspon al quinzè aniversari de la mort de l'autor de l'esperanto i per tant hom no podia escollir un dia més apropiat que, coincidint amb una festa, portés a la memòria de tots els esperantistes una data de dol per a tots els amants de la pau, de la comprensió i de la llibertat lingüística dels pobles.

No cal dir com és d'imprescindible que en aquell dia es trobin a l'acte inaugural tots els esperantistes de Barcelona, no solament per retre homenatge al mestre, sinó també per tal de demostrar davant de la ciutat i davant de les autoritats que presidiran la inauguració, la importància del contingent d'esperantistes que a Barcelona lluiten per tal de donar als homes el mitjà de relació més humà i més just.

Es necessari que totes les entitats hi assisteixin amb la senyera, com també que tots els esperantistes portin l'estrella verda. Ens hem d'esforçar a donar la sensació de potència i de convicció.

Les entitats de fora Barcelona, donant una nova prova de germanor i de col·laboració, haurien d'assistir a l'acte també.

A l'objecte de cloure la festa d'una manera íntima entre els esperantistes i per tal de confraternitzar amb els companys forans, ha estat organitzat un banquet al Restaurant La Pàtria (P. Sepúlveda). La inscripció, que és de 15 pessetes pot fer-se a l'estatge de la Federació i de totes les entitats esperantistes locals, fins el dia onze d'abril.



Ja era hora que a la capital de Catalunya hi hagués un carrer amb el nom del Dr. Zamenhof. Els treballs per aconseguir-ho daten de molt de temps i han estat fets per tots els sectors esperantistes. A la Federació Esperantista Catalana li ha correspost l'honor de l'èxit, el qual fem extensiu a tots els que han prestat llur suport, directa o indirectament. Menció a part es mereix l'activíssim samideano Joan Gili Norta, gràcies al qual tot ha rutllat com una seda.

La placa, com hom podrà comprovar, és una obra mestra en la qual han intervingut els samideanoj Jacint Comella, autor del dibuix, i Jaume Barba, autor del treball en el marbre.

### UNA ADHESIO IMPORTANT

El grup "Paco kaj Amo", la simpàtica agrupació esperantista de Gràcia, va acordar en l'última reunió general de socis reingressar a la Federació Esperantista Catalana.

Agraïm de tot cor el testimoni d'afecte i col·laboració, que mai ens han regatejat, que amb aquest acord novament han palesat els socis del grup degà de Barcelona.

Esperem que els altres grups de Barcelona i altres poblacions de terres catalanes imitaran, en data ben propera, el grup "Paco kaj Amo", que no ha dubtat un moment a posar-se al costat dels que a Catalunya interpreten la veritable essència de l'Esperanto com a segona llengua per a tothom.

### DONATIU PEL "K. E."

El nostre amic i conegut *pioniro* a Palma de Mallorca, En Narcís Bofill ha cedit l'import de la seva acció pro Zamenhof-disko, la qual suma la quantitat de 50 pessetes.

Li agraïm sincerament aquesta ajuda.

### LLISTA DELS "AMICS DE KATALUNA ESPERANTISTO"

Enric Adam.	Antoni Codorniu.
S. Alberich Jofré.	Jacint Comella.
Valentí Alavedra.	Delfí Dalmau.
Jacint Bremon.	J. Font Giralt.
Eduard Capdevila.	Maurici Orriols.
Ramon Cirera.	R. Torras Carreres.

Són "Amics de Kataluna Esperantisto", aquelles persones que paguen una quota voluntària de 3'35 pessetes mensuals, o 10 pessetes trimestrals.

Tots els "Amics" tenen dret a ésser anunciats gratuïtament un cop a l'any en la revista.

Esperantista: retén curiosament els seus noms.



## EN DEFENDO DE LA KATALUNA LINGVO

Zaragoza, 23-9-31.

S-ro. Jaume Grau Casas.

Direktoro de "Kataluna Esperantisto".

Kara samideano:

Mi ĵus ricevis vian leteron de la 21 de la nuna monato, kiun mi respondos amplekse tuj kiam la libertempo permesos al mi.

Nune, nur tiujn vortojn: Mi intencis ĝeni neniun. Se vi aŭ alia, tial ke oni ne komprenis la veran tendencon de miaj vortoj, sentis sin ĝenata, mi multe bedaŭras kaj petegas al ĉiuj koran pardonon.

Mi finas ripetante frazon publikigitan ĉe la malfeliĉa artikolaĉo: "Mi plezurege perdus mian kastilan lingvon, se iun tagon ni ĉiuj ellitiĝus parolante unikan lingvon... la katalunan..."

Nove pardonon kaj estu certa pri la alta estimo de via sindonema. — J. O.

Sron. J. O. ni persone konis dum la tagoj, kiujn ni pasigis en Zaragoza ĉe la starigo de Hispana Esperantista Konfederacio en pasinta Oktobro, kaj jam tiam li klarigis al ni la signifon de lia artikolo "En kiu jarcento ni vivas?", kiu alie nur celis ironie pentri nuntempan lingvodiversecon. Sro. J. O., kiu okupas gravan postenon ĉe la hispana esperanto-movado, estas unu el la legintoj kaj admirantoj de la verko "Kataluna Antologio" el kiu li eltiris ankoraŭ duoblan respekton por *la kataluna afero*.

*E. Capdevila, sekr. de l'Redakcio.*

## ALFONS SABADELL

Ni ricevis la doloran sciigon, ke nia malnova samideano Alfons Sabadell mortis en Italujo, kien li transloĝiĝis antaŭ nelonge.

Li estis Lingva Komitatano de antaŭ multaj jaroj, tradukis diversajn verkojn de la kataluna dramisto Santiago Rossinyol, partoprenis en la organizado de la V-a Universala Kongreso en Barcelona, kaj konservis la voĉon de nia Majstro en unika fonograf-cilindro, kiun lastatempe li transdonis al la "Kataluna Esperantista Federacio". Dank' al tio, nia KEF povis eldoni la 50 gramofondiskojn enhavantajn saluton de D-ro Zamenhof al la Barcelonaj esperantistoj kaj dankparoladeton al la aranĝintoj de la Kvina kongreso.

Kvankam, en la lastaj jaroj, Alfons Sabadell ne aktive partoprenis la movadon —li estis preskaŭ sepdekjarulo—, lia perdo tre dolorigas la koron de ĉiuj katalunaj esperantistoj.

Al lia familio ni esprimas nian sinceran kondolencon.



## BONA VIRO KAJ LIA FILO

fragmento de "Grafo Lucanor"

—Sinjoro grafo Lukanor —diris foje Patronio,—bona viro, terkulturisto, havis fraŭlan filon, tre lertan, al kiu la patro, lacigite de la maljunecaj malhelpoj, deziris transdoni la hejman mastrumadon. Sed li tion ne kuraĝis, ĉar la knabo, tre malkonfidema pri siaj propraj iniciatoj, sin lasis tamen regi de la konsilo de la lasta homo, kiun li renkontis; kaj, ĉar la opinioj estas tiel malsamaj kiel la homoj estas, kredis prave la patro ke, se la knabo regos, ĉio estos fari kaj malfari en lia bieno. La vinberujaroj estos destinataj al plugteroj, tiam, kiam iu tiel konsilos; la herbejojn oni igos arbaro, kaj legomĝardeno la olivarbarojn.

Pro la deziro, ke la knabo lernu sin regi per sia propra ideo kaj ne estu ludilo de malpropraj opinioj, ian ajn foiran tagon la bona viro decidis iri en la apudan urbon, kun sia filo, kun la preteksto akiri kelkajn bezonatajn aferojn.

Ili ekmarŝis, kondukante antaŭ si azeneton, sur kiun oni ŝarĝos la aĉetaĵojn. Malmulte da tempo poste, ili preterpasis aron da terlaboristoj venantaj el la urbo. Ili sin reciproke salutis per unu "Sanktan kaj bonan tagon", kaj tuj kiam ili pasis, diris la bona viro al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.

La vojirantoj diris, meze de ridoj kaj ŝercoj:

—Jen bona paro da malsaĝuloj; ambaŭ piedirantaj kaj la azeno sen ŝarĝo.

Kion ci pensas pri tio?—demandis la bona viro.

—Ke ili diras veron—respondis la fraŭlo;—ĉar la azeno ne estas ŝarĝita, ni ne estas pravaj piediri ambaŭ.

—Do rajdu sur ĝi—ordonis la patro.

Ili daŭrigis sian iradon, je sufiĉe longa spaco, ĝis ili preterpasis alian aron da vojaĝantoj. Ili sin salutis reciproke per la "Sanktan kaj bonan tagon", kaj tuj, kiam ili preterpasis, diris la bona viro al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.

La pasintoj diris: Neniam oni vidis tian agon; la laca maljunulo piede, kaj la fortika fraŭlo rajde.

Kion ci pensas pri tio?—demandis la bona viro.

—Ke ili estas pravaj—respondis la fraŭlo,—ĉar la penoj pli konvenas al la freŝaj fortoj, ol al tiuj de la jaroj lacigitaj.

—Do malsupreniru, ĉar mi rajdos sur la azeno.

Tiel ili faris, kaj tiamaniere ili vojiris antaŭen, ĝis kiam ili trovis novan aron da vilaĝanoj. Ili sin salutis per tiu "Bonan kaj sanktan tagon", kaj tuj, kiam ili preterpasis, la viro diris al sia filo:

—Haltu momente kaj aŭskultu tion, kion ili parolas.



La plugistoj diris:

—Ĉu vi vidis? La malforta fraŭleto piede, kaj la forta viro, kutimiĝinta al ĉiaj mondaj penoj, rajde.

—Kion ci pensas pri tio?— demandis la bona viro.

—Ke ili estas pravaj —respondis la knabo,— ĉar tiu, kiu pli longe estas kutimiĝinta al ĉiaj penoj kaj laboroj...

—Do metu vin malantaŭ min, sur la postaĵon.

Tion faris la filo kaj ili daŭrigis tiel, kelkan tempon, ĝis ili trovis novan aron da kamparanoj. Ili sin salutis per "Sanktan kaj bonan tagon", kaj tuj, kiam la kamparanoj preterpasis, la bona viro diris al sia filo:

—Haltu momente kaj ni aŭdu tion, kion ili diras.

La kamparanoj diris: —Jen bona paro da mallertuloj; ili elkrevigos la azeneton, antaŭ ol fini la vojiron.

—Kion pri tio ci pensas?

—Ke ili ne eraras —respondis la fraŭlo—, ĉar tiel malforta estas la azeno, ke, kun ni ambaŭ sur la lumboj, apenaŭ ĝi povas fari paŝon.

Haltigis tiam la bona viro la rajdbeston, turnis sin malantaŭen, kaj, alparolante la filon, li diris:

—Ci diru al mi, kiu estas prava, kaj kies opinion ci obeos. Ĉar el nia hejmo ni eliris la du piede, kaj ne mankis iu, kiu nin mallaŭdis, pro tio ke ni kondukas la azenon sen rajdanto; ci rajdis poste, kaj estis iu, kiu ne konformiĝas al la fakto ke la junulo rajdas, dum la maljunulo piediras; alia trovis malprava la kontraŭan agon, kiam mi okupis la azenselon; kaj, fine, malplaĉis al alia ke ni du nin metits sur la dorson de la besto. Kaj tiujn opiniojn ci prenis, unu post alia, kiel ciajn. Kion ni povos fari, ke ĝi estu ŝatata de ĉiuj? Nu, mia filo, ni faru la bonon laŭ nia konscienco, kaj ni malestimu la babiladon de la mondo. Tial, ĉar mi kredas tion justa, mi rajdos kaj ci kondukos la rajdbeston.

—Do ni iru, hop!

#### INFANTE DON JUAN MANUEL (1282-1348)

Trad. el la hispana: AMALIA NUÑEZ

#### A. S. CENTRA ESPERANTO LIBREJO

En la jara ĝenerala kunveno de akciuloj de la Akcia Societo "Centra Esperanto Librejo" en Hago (Nederlando), okazinta la 27-an de Februaro, la bilanco kaj la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobataj kaj la dividendo pri 1931 fiksata je 7 % (kiel antaŭan jaron). Kiel komisaro estis reelektita S-ro J. L. Bruyn.

Konforme al la statuto la kunveno priparolis la dividon de la plia profito kaj decidis donaci 102.53 guldenojn al la komitato por la starigo de la Zamenhofa monumento en Bjalistok (Polujo).



## DEMANDO DE CIFEROJ

“Emin'kaptita!” Tra Stambul' subite kuras famo...  
 Rabiston spitan vidi la regnestro ekdeziris.  
 Eminon oni al palac' kondukis. Al sultano  
 sentime proksimiĝis li kaj jenajn vortojn diris:

“Egale estas ambaŭ ni laŭ kruelec' sultanoj.  
 Al mia nom', al via nom' la ĝlor' sin same ligas.  
 Je fortikaĵoj ĉasas vi kaj mi—je karavanoj.  
 Mi domojn kaj vi regnojn, sed ni ambaŭ ruinigas.

Mi kaj vi same, vivas per bataloj, militiroj  
 Mi sola iras, kaj vi kun soldatoj kaj veziroj.  
 Demando de ciferoj: jen la diferenco tuta.

Se milojn da kanonoj kaj pafiloj mi disponus,  
 sendube, ke mi, kiel vi sur seĝ' kalifa tronus...  
 Nun, se vi volas, sendu min al loko ekzekuta!”

STOJAN MIKAILOVSKI

El la bulgara lingvo trad.: Ivan H. KRESTANOV

## L'ESPERANTO MARXA

Atenes. — El ministre d'Instruĉio Pŭblica insisteix, en una nova circular, a recomanar als inspectors generals d'escoles que facilitin l'ensenyament de l'ESPERANTO a les escoles “per la importancia que diariament obté en el mŕn civilitzat la llengua internacional Esperanto”.

Cagnes-sur-Mer. — L'exemple d'usar l'ESPERANTO per a les senyals de tràfic donat per l'Ajuntament de Cannes ha estat imitat per la pintoresca poblaciŕ de Cagnes-sur-Mer, situada entre Cannes i Niça. S'han fixat ja els primers pals indicadors com “Halto por Aŭtobusoj” i altres. També l'alcalde vol donar el nom de Doctor Zamenhof a un carrer de la vila.

Lyon. — L'Ajuntament d'aquesta ciutat, presidit pel senyor Herriot, ex-cap de ministeri i ex-ministre d'Instruĉio Pŭblica, unànimament va prendre l'acord d'exposar pŭblicament el desig d'aconsejar que l'ensenyament de l'ESPERANTO sigui obligatori en totes les escoles d'arreu del mŕn.

Odessa (Ucrània). L'Editorial de l'Estat d'Ucrània prepara l'ediciŕ, en ESPERANTO, d'una antologia d'escriptors ucranians.

Osaka (Japŕ). — La important estaciŕ radio-telefŕnica d'Osaka



## QUESTIO DE XIFRES

“Emín és pres!” Per tot Stambul de sobte el rumor corre...  
Esguardâ el tan temut bandit el rei ara reclama.  
Emín, conduit al davant del Sultan, se li ocorre  
parlar-li sense gens de temença. Així exclama:

“Igualment som tots dos sultans en crueltats, vileses.  
El meu nom, el teu nom coberts de glòries endevines.  
Caço caravanes, com tu conquistes fortalezes.  
Jo cases, tu regnes: tots dos convertim en ruïnes.

Jo i tu vivim ensems, amic, del lluitâ amb ferotgia.  
Jo vaig sol, tu de soldats i visirs en companyia.  
Qüestió de xifres: vet aquí la sola diferència.

Si milers de fusells, canons, ara aquí jo tenia,  
sens cap dubte com tu al tron dels califes seuria...  
Ara, a l'execució, si vols, envia'm sens clemència!”

Traduit de l'esperanto al català per JAUME GRAU CASES.

va radiar durant els dos mesos darrers de l'any 1931 un curs d'Esperanto.

La radiació del dit curs fou un èxit, puix calgué fer DUES edicions (uns 18.000 exemplars) de la gramàtica amb què se seguia el curs. A més, el nombre d'alumnes que enviaren els dictats per a prendre part en els exàmens va pujar la xifra de MIL DOS CENTS.

Praga. — El ministre de Comunicacions Postals i Telegràfiques, en decret del darrer desembre, permet l'ús de l'ESPERANTO en les emissions dels ràdio-aficionats “puix cal considerar-la com a llengua clara”.

Varsòvia.—El segon més important diari per a metges “Kwartalni Klinikny”, des d'ara, després dels articles originals, afegeix un resum dels mateixos en ESPERANTO.

## ASSEMBLEA GENERAL DE K. E. F.

D'acord en allò que disposa l'article cinquè dels reglaments de la Federació Esperantista Catalana, el Consell Directiu de la mateixa ha fixat el dia 22 de Maig vinent, a dos quarts d'onze del matí, la qual tindrà lloc sota l'ordre del dia, que oportunament es comunicarà a tots els federats.



*Ni represas kun ĝojo artikolon kaj leteron, kiujn sendis al ni la senlaca samideano pastro Font Giralt, entuziasmigita simpatianto de la pacifista movado.*

### PACIFISTAJ GLUMARKOJ EN ESPERANTO

La INTERNACIA LIGO de VIRINOJ por PACO kaj LIBERECO ĉiam klopodas fervore por pli da justeco en la mondo; la aktualaj problemoj, kaptas ĝian atenton. La senarmiga konferenco nun estas la ĉefa prizorgo de la tuta mondo. La franca sekcio de tiu ĉi ligo laboras en Francujo por efektiviĝi senarmigon. Ĝiaj estrinoj iniciatis presigi glumarkojn, kiuj rondiros tra la tuta mondo. La markoj estas presitaj en tri lingvoj: germana, angla, kaj franca, sed por doni la plej eblan internaciecon al la propagando, la francaj estrinoj, kiuj estas tute favoraj al Esperanto, presigis ankoraŭ glumarkojn en Esperanto.

En Francujo oni volas enkonduki Esperanton en tiun ligo kaj starigi dum 1933, internacian somerkurson, kie oni uzos nur Esperanton.

Kuraĝigu tiujn estrinojn aĉetante grandkvante glumarkojn.

La bildon desegnis famkonata artisto Paul Colin. Ĝi montras du epokojn; Homo kun bajoneto, sed... bandaĝita kapo, aspektanta kiel mortanto; ĝi indikas la nunan staton, kun armiloj, sed..., malantaŭe, konture ekaperas pura vizaĝo kun olivbranĉeto... estas la estonta stato!!!: la paca regno per senarmigo!!!

Ĉiu marko kostas 0 frankon 10 centimojn.

Ĉiu folio: 4 francajn frankojn, Kaj ili estas haveblaj ĉe K. E. F.

Fragmento de letero de Sino. Borel al Ptro. Font Giralt.

“Mia amikino Sino. Guinaud deziras ke mi sendu al vi tiun ĉi artikoleon, kiun ŝi pretigis por propagandi nian porpacan glumarcon. Ŝi esperas ke vi bonvolos mendi kelkajn foliojn, vendotaj en via lando. Kompreneble mi ankaŭ ĝojus se vi povus tion fari... sed ĉu vi povos?!!!... ni treege dezirus sukceson al tia entrepreno. Kaj ĉar nur esperantistoj povas ĝin aĉeti ni jam sendis certan kvanton al Ĉeĥoslovakujo. Hungarujo, Nederlando, Svisujo, Svedujo, Anglujo, Germanujo, sed en via lando, krom vi, ni konas nenium... Bonvolu senkulpiĝi nian troan postulecon... sed tamen... komprenu, ke nur por grava celo ni kuraĝas vin tedi.”

### VOJAĜO AL PARIZO

La Orienta Esperantista Federacio voĉdonis la Komitaton por la aranĝo de la karavano kiu ĉeestos la proksiman universalan Kongreson de Esperanto okazonta en Parizo.

La Komitato jam komencis labori kaj jam nun ĝi faras klopodojn por atingi rabaton en la fervojoj.

Ĉiu kiu deziras informojn pri la aranĝoj, bonvolu sin turni al la Sekretario S-ro Andrés Piño Alegret, Strt. Colón, 24, Valencia.



## BIBLIOGRAFIO

*Kataluna Antologio*, dua eldono, verko rekompencita de la "Esperantista Akademio", 416-paĝa volumo, 22 x 16 cm., kompilita kaj plejparte tradukita de Jaume Grau Casas, L. K. Eldonis: "Editorial Ibèrica", str. Londres, 188, Barcelona. Prezo: 10 pesetoj.

Dua eldono de tiu ĉi grava verko fariĝis necesa jam antaŭ 4 jaroj pro la rapida elvendiĝo de la unua eldono, kiu estis la tiutempa revelacio ĉe la literaturamantoj de nia movado, kiuj ankoraŭ ne estis vidintaj similan antologian verkon en esperanto. Ne vane ĝi meritis rekompencan de la Akademio.

Kiu kuraĝus fari kritikan recenzon de tiu ĉi verko, kiu meritis siatempe, kaj nuntempe ankaŭ pro tiu ĉi dua eldono, entuziasmigitaĵojn laŭdojn de la plej kleraj literaturistoj kaj eminentaj pioniroj?

Kvankam tiu ĉi demando kapablas malstreĉigi la cerbon kaj senmovigi la plumon al iu ajn kompetenta recenzisto, almenaŭ restas al ni, tial ke ni estas katalunlingvanoj kaj konas la katalunlingvan literaturon, la espero diri ion novan, ankoraŭ nediritan, pri la elektitaj pecoj kaj tradukoj, pri kiuj ni nur povas malsekretigi, ke ili faligis nin en admiron.

La plej kolosan laboron ni ŝuldas al la kompilinto, kiu elektis por si la plej malfacilan parton ĉe la tradukado. Kaj ne nur kiel simpla tradukisto li sukcesis, sed ankaŭ kiel literatura historiisto. Nur dank' al sia erudiciemo li majstre klarigas, en rezuma formo, la katalunan lingvon, kulturon kaj literaturan disvolviĝon, de la eknaskiĝo ĝis la nuntempo. Kiom da katalunoj ĝojus se ili havus en sia propra lingvo la literaturan historian resumon de "Kataluna Antologio", kiu okupas multajn paĝojn.

Apartan mencian meritas la laboro farita ĉe traduko de la versaĵoj, kiuj estas senriproĉe fidelaj al la originalo. Fratoj Josep kaj Jaume Grau Casas, ambaŭ Lingva-Komitatanoj, preskaŭ duonigis al si tiun ĉi malfacilan taskon, kiu tiom meritigas iliajn tradukojn. Speciale elstaras, pro sia malfacila tradukebleco, la mezepokaj poeziaĵoj kaj popolkantoj, kies respektivaj tradukoj transsaltis ĉiujn malfacilaĵojn post peniga laboro. Nur tiel la nekataluna samideanaro povos ĝui la legadon de kelkaj poezioj kaj fragmentigitaj noveloj de la katalunaj klasikuloj de la VXa jarcento, epoko nomata de la "nacia formiĝo".

La elekto kaj kronologia ordigo de la modernaj aŭtoroj estas nova sukceso de la aŭtoro de "Amaj Poemoj", kiu sciis taksu la literaturan valoron de la verkistoj antaŭaj al Jacint Verdager, kaj ne katalogis ilin en sian Antologion, kiu alie devus esti trioble pli ampleksa se ankaŭ oni estus enmetinta la plej nuntempajn katalunajn verkistojn. S-ro Grau Casas prezentas al ni en sia antologio nur tiujn aŭtorojn, kiuj post la revekigo de nia lingvo en



la pasinta jarcento donis al ĝi riĉan floradon kaj prosperon, kiu kondukis ĝin al la stadio de la kulturlingvoj de Eŭropo.

La plej bonaj literaturistoj estas abunde tradukataj. Ĉe la vicoj de la poetoj staras la du famaj trioĵoj de la revekiĝo kaj de la maturiĝo: Verdaguer-Maragall-Guimerà, apartenantaj al la pasinta jarcento, kaj Guasch-Carner-Segarra, tri princoj de poezio de la nuntempa kataluna lingvo. Ĉe la prozistoj ni trovas ĉiujn aŭtorojn plej konatajn de la katalunaj legantoj. Tre longe estus citi ilin.

La dua eldono de "Kataluna Antologio" enhavas tri novajn aŭtorojn, kiuj povis esti enmetataj dank' al la forigo de dek melodioj, kiuj antaŭe akompanis la tekston de la popolkantoj.

La komprenebla lingvaĵo kaj klara stilo de la teksto faras tiun ĉi verkon unu el la plej rekomendindaj pro la klasika kaj fundamenta esperanto uzata. Ni deziras al la verko similan elĉerpiĝon, kian havis la unua eldono, kaj ke ĝi alportu ekster Katalunujo tiun freŝan senton de amo kaj solidareco de nia kataluna gento por tiuj popoloj, al kiuj ankoraŭ dum la XX-a jarcento pezas la katenoj de ies subpremo.

"*Socialismo*", poemo de Aleksandro Bezimenskij. Tradukis el rusa lingvo N. V. Nekrasov. Eldono de *Ekrelo*, Löbauerstr., 31, Leipzig-N. 24. Broŝuro 40-paĝa, 16 1/2 x 12 cm., prezo 0,35 gmk.

Bezimenskij estas juna poeto kiu konvertiĝis al la komunismo post la revolucio kiun gvidis Lenin. Li ĉerpas sian inspiron por verki la poemon "Socialismo" el la febra laborado por finatingi la tiom sopiratan kvinjaran planon de Stalin. Kelkfoje la poemo tiom forte pulsas, ke oni sentas sin katenita de ĝiaj jen longe, jen mallonge sin etendantaj verslinioj.

Du mallongaj versaĵoj finas la klasbatalan poemverketon: "Patrino" kaj "Partibiletto n.º 224.332". Ambaŭ estas inspiritaj kaj sentoplenaj. ĉefe la lasta, kiu plendas pro la morto de la ĉefgvidinto de la rusaj komunistoj; Lenin.

N. V. Nekrasov, la tradukinto, bonega poeto esperantlingva, kiu diversfoje honoris niajn paĝojn per siaj versaĵoj, faris tradukon aparte meritan pro ĝia rimriĉeco.

*La Himno*, novelaro originale verkita de M. Ljubin. Eldonis *Ekrelo* en 36-paĝa broŝuro, 16 1/2 x 12 cm. Prezo: 0'30 gmk.

Iun tagon esperantista komunisto provis konvinki nin pri kelkaj novaĵoj enkondukitaj en la gramatikon de nia lingvo. Li asertis, ke la proleta movado iel influas kelkajn aspektojn de la klasika kulturvivo, eĉ tiujn ŝajne neŝanĝeblajn, kiel la gramatiko mem.

Ni ne vane rifuzis similajn asertojn. *La Himno* kontraŭdiras la pretenditajn influojn. Tiu ĉi verketo bone anstataŭas, ĉe komunisto reĝimo, tiun tiel konatan literaturon por la lernejinferoj. La sama pedagogia celo kaj procedo, nur kun la oportuna ŝanĝo de la aktoroj kaj temoj.



M. Ljubin, por ni ankoraŭ nekonata verkisto, sukcesis en tiu ĉi verketo kiel literaturisto kaj stilisto. "La Himno" estas unu el la diversaj rakontoj, kiuj konsistigas la verketon, kiu pentras per kruda ironio tumulton en karcero. "Kamarado Bojko", pro sia interesa altiro, pensigas pri "La nigra virino" aŭ similaj rakontoj.

La stilo estas klara kaj facile esprimas la penson de la aŭtoro. Nur meritas riproĉon la uzo de "eventaĵo" anstataŭ "eventualaĵo"; "teroro" anstataŭ "teruro". Preseraroj forestas, nur nerimarkitan vi trovos sur paĝo 28; "sencermonia".

Edca.

### SIRKALENDARO POR 1932

Praktika mur- kaj tablo-kalendaro kun semajnfolioj. La nunjara kalendaro estas multe pli valora ol la pasintjara. Ĝi enhavas utilajn indikojn, artikolojn, poemojn, pli ol 100 anekdotojn, spritaĵojn, ridigajn preserarojn, humorbildojn (ĝi estas precipe dediĉita al la bonhumoro), kaj amason da bonaj konsiloj por esperantistoj, parte en formo de sentenco, ekz.: Toleremuloj estu ja ni, ĉiam laboru en harmoni! — Cu britoj, francoj, germanoj — ni estu samideanoj! — — La kalendaro kostas, kiel murkalendaro, gmk. 1.50; kiel tablo-kalendaro, kun metala submetaĵo, gmk. 3.20.

### FLORENCE BARKER: LA LINGVO DE LA BESTOJ

Prelego farita dum kunsido de "Amikoj al la Bestoj" en Kolegio Christ Church, Oxford, ĉe la 22-a. Universala Kongreso de Esperanto. Kun portreto de la hundino Chum. 24 paĝoj. 10,5 x 15 cm. Broŝurita. Prezo gmk. 0'25. Propra eldono de la aŭtorino.

### SIGELMARKOJ KUN PROPAGANDOTEKSTO POR ESPERANTO

En lingvoj angla, Esperanta, franca, germana, hispana kaj sveda. Trikolore presitaj. Ĉiu lingvo en aliaj koloroj. En folioj po ok markoj tekstantaj pri radio, transoceana aviado, fervoja kaj aŭtomobila trafikoj, sporto, turismo kaj internacia komerco. La tekstoj harmonias kun rilataj vinjetoj. Unuopa marko 3,5 x 5 cm. Prezo: 10 folioj gmk. 0'55 afrankite, 70 folioj gmk. 3'30 afrankite. Ĉiuj estas eldonitaj kaj haveblaj ĉe "Heroldo de Esperanto", Brüsseler Strasse 94, Köln, Germanujo.



## ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—Viglan agadon malvolvas la junaj esperantistoj de la grupo "Paco kaj amo" dum la komencanta nova jaro.

Komence de Aprilo estos klarigataj tri kursoj, gvidataj de niaj konataj samideanoj J. Alberich, D. Massachs kaj S. Alberich.

Ni ŝuldas tiun-ĉi brilan laboron al la nova komitato, kiu de post la ĝenerala kunveno okazinta la 17-an de Januaro estas la jena: Prezidanto, P. Casanellas; vicprezidanto, V. Mestres; sekretario, S. Alberich; vicsekretario, R. Fernández; kasisto, M. Prujà; kalkulisto, J. Marimon; bibliotekisto, J. Nagore; voĉdonantoj, E. Garcia, A. Múñiz, L. Nagore, kaj M. Múñiz.

— La grupo "Nova Sento", malgraŭ la eĵaj ŝanĝoj kiujn ĝi estis devigata fari, ne perdas sian tradician entuziasmon kaj ĝi jam preparas novajn kursojn por la monato Aprilo. Kiel varbilo por la anoncitaj esperanto-kursoj, i. a., oni aranĝos paroladon de la konata geologo Albert Carsi. La kursoj kaj propagandaj vesperoj okazos en la nova ejo de la grupo, strato Llull, 210.

En la ĝenerala kunveno de tiu-ĉi grupo, okazinta la 17-an de Februaro, estis elektata la jena komitato: Prezidanto, J. Llorens; vicprezidanto, P. Noguera; sekretario, A. Pujol; vicsekretario, J. Bonet; kasisto, R. Burgada; kalkulisto, E. Gili; bibliotekisto, I. Gil; voĉdonantoj, B. Zanon, F. Peña, M. Peris, kaj A. Boronat.

— Okaze de la XXIII-a datreveno de la fondo de la grupo "Barcelona Stelo", oni aranĝis amuzan vesperon, kiu okazos la 24-an de Aprilo ĉe la teatro de "Cooperativa La Barcelonesa", Urgell, 180 (ejo de la grupo). La fama kantista rondo "La Violeta d'en Clavé" partoprenos la feston kaj kantos nian himnon "La Espero".

Krom la elementa kurso gvidata de fraŭlino R. Forment, funkcias en tiu-ĉi grupo supera kurso gvidata de ĝia sekretario R. Moret.

Vendrell.—La malnovaj samideanoj de la grupo "Frateco" sukcesis enmeti en la ciklon de paroladoj, organizitaj de "La Lira Vendrellenca", propagandan paroladon por-esperantan.

Nia amiko Jaume Grau Casas, kiu prizorgis la nomitan paroladon, disertaciis dum la 23-a de Januaro pri "L'Esperanto creador d'una cultura internacional", kaj ĉe la fino li estis varme aplaŭdata de la multnombra ĉeestantaro kiu plenigis la vastan salonon de "La Lira Vendrellenca".

Post la parolado, S-ro. Grau, kiu restis admirata de la esperantemo de la Vendrell-anoj, interparolis kun niaj ĉi-tieaj samideanoj pri la ebleco organizi tie, dum la venonta jaro, niajn Florajn Ludojn kaj Kongreson. Tiu-ĉi propono estis ĝoje akceptata por pristudo de la anoj de "Frateco", kiuj esperas baldaŭ labori tiucele.



## **Esperantistes de parla catalana:**

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

## **Federació Esperantista Catalana**

i a la vegada feu-vos abonats del seu òrgan oficial

## **Kataluna Esperantisto**

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:  
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

La Federació Esperantista Catalana paga, per cada un dels seus adherits, 60 cèntims a l'any a la Confederació Esperantista Espanyola, de recent fundació.

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

---

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

**Carrer València, 245. - - Barcelona**



# L I N G U A P H O N E

estas la plene scienca metodo por lernado kaj lernigado de

## E S P E R A N T O

kaj aliaj lingvoj praktike.

... Estas libroj kun ilustraĵoj kaj traduko por la vido kaj kompreno.

Estas diskoj enparolitaj de Edmond Privat por la aŭdo, ripetado kaj lernado. ...

Petu senpagan propagando-broŝuron detale krarigan. Sciigu viajn nomon kaj adreson al,

L I N G U A P H O N E I N S T I T U T E en Barcelona

strato València, 245.—Poŝtkesto, 319.

Verkoj de J. BREMON MASGRAU

“Gramática y vocabulario de Esperanto”

Editorial Atlante, Barcelona

“¿Quiere usted aprender Esperanto?”

Manual de conversació. Editorial Atlante

KATALUNA SLOSILO

Eldonita de K. E. F.

“HEJMA PROZO”

Libreja Fako de Heroldo de Esperanto